

**Numero: 332.
Janaro 2020.**

28-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Januaro

Ĝis nun en mia urbo ankoraŭ ne neĝis, kvankam jam estas januaro, la pinto de la vintro.

Mi rememoras, infanaĝe antaŭ multaj jardekoj en ĉi monato la vintro furiozis.

Ĉion kovris neĝo kaj glacio. La homoj froste iris sur la stratoj.

Jes, tiuj veraj iamaj vintroj. La mondo ŝanĝiĝis, ankaŭ en januaro estas varma vetero kaj nur malofte negas kaj frostas.

Ĝenerale mi ŝatas la vintron. Ĝi sugestas al mi trankvilon kaj pacon.

Nuntempe la mondo bezonas trankvilon kaj pacon. Ni ne scias, kio okazos morgaŭ. La terglobo estas en danĝero. Se ni ne atentos pri ĝi, tiam Tero pereigos.

Estus bone vivi en eterna paco kaj la homoj kaj ĉiuj loĝantoj de Tero povus vivi harmonie kaj oni ne devus timi de militoj.

Jaro ne pasas sur la terglobo, ke ie ne estus milito kaj bataloj. Kial murdi unu la alian? Ja, la vivo estas mallonga. Rapide forpasas la vivo de la homo. Kial rapidigi ĝin per sangaj militoj?

Kompreneble mi ne scias la respondon kaj laŭ mi ankaŭ aliaj homoj ne scias.

Ĉu estas priskribita ie, ke sur Tero devas esti milito?

Laŭ mi, tia skribaĵo ne ekzistas. La homoj naskiĝis por vivi pace unu kun la alia.

Ĉu mi erarus?

Kiel mi komencis januaro estas vintra monato, sed la klimato ege ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj.

Mi ne scias, ĉu en mia vivo ankoraŭ estos vera, animagorda vintro aŭ ni devos alkitimiĝi al la nova situacio.

Estus tre, treege bone, se ankaŭ niaj nepoj ekscius tiujn malnovajn vintrojn, iuj estis en mia infanaĝo antaŭ multaj jaroj.

— Redaktanto —



Surstrate

Du homoj promenis sur la strato kaj ili babiladis. Ili priraktis la aferojn de la lando kaj la mondo. Kompreneble ilin interesis ankaŭ aliaj aferoj, kiel ekzemple la lingvoscio de la gejunuloj.

— Kiam mi estis lerneĵano ni lernis la rusan lingvon – diris la malalta viro.

— Jes, ankaŭ mi lernis ĝin. Ja, ni estas preskaŭ samaĝaj. Ĉu ne? Ĉu ankoraŭ vi scias iomete tiun ĉi lingvon?

— Ne. Mi estis tre maldiligenta lernanto. Mi ne ŝatis lerni, ĉefe lingvojn.

— La nunaj lerneĵanoj devas lerni la anglan aŭ la germanan lingvojn.

— Mia nepino ĵus komencis lerni la francan lingvon, sed ŝin ege interesas ankaŭ la ĉina lingvo.

— Onidire la ĉina estas tre malfacila pro la skribosignoj kaj la prononcoj.

— Kion fari, se ŝin tiu ĉi lingvo interesas? La nunaj gejunuloj povas elekti iun ajn lingvon.

— Tamen la plej multaj gejunuloj elektas la anglan.

— Ĉu vi miras? Ĝi estas mondlingvo.

— Ankaŭ la rusa estas mondlingvo.

— Ĝin ni devis lerni pro politiko.

— Kial oni lernas tiom multe la anglan? Ĉu ĝi ne estas politiko? Kiel fariĝis mondlingvo la angla. Ĝi disvastiĝis per sango kaj perforto.

— Se tiutempe en la mezepoko, ni hungaroj ne defendintus Eŭropon de la turka invado, se ni kuniĝintus kun la turka armeo, tiam eble nun anstataŭ la angla lingvo turkhungara lingvo estus disvastiĝinta en la mondo. Sed mi bone scias, en la historio ne ekzistas: „kio estus okazinta, se...”.

— Vi bone parolas. Nun la angla lingvo konkeris ĉiujn landojn.

— Sed kio okazos, se disfalos la nuna politika sistemo kaj sur la terglobo ekaperos novaj politikaj potencoj kaj tiuj devigas lerni sian lingvon al la homoj? Kiomfoje oni devos komenci denove la lingvolernadon?

— Tial estus bezonata sendependa lingvo, kiu apartenas al neniuj, sed ĝi estas ĉies lingvo – diris la viro kaj ili turnis sin ĉe la sekva strato.

— Ŝaŝa —



La olduloj revadas

Okazis antaŭ multaj jaroj en malgranda urbo fore de la mondo.

Estis somere kaj la homoj preskaŭ ĉiuj libertempis. En la urbo restis nur kelkaj homoj. Ankaŭ ili enuis kaj ege suferis pro la varmego.

La stratoj malpleniĝis. Ĉiuj vivaj estaĵoj serĉis iom da ombro. Homoj tie sidadis refreŝigante sin glaso da glaciomalvarma biero.



En la subĉiela parto de la bierumejo ili sidis triope. La kelnero de malproksimo rigardis ilin.

La tri gastoj estis maljunuloj. Unu el ili jam pasis okdekjaraĝa kaj li alparolis nur malofte al la babilado. Gradparte la du aliaj „olduloj” parolis.

Ili rememorigis la junecon kaj la forflugantajn jarojn. Ilia vivo ne estis facila. Dum la jardekoj ili travivis multajn aventurojn kaj malfacilaĵojn.

La okdekjarulo nur aŭskultis ilin.

— Unufoje mia edzino trompis min — diris la plej juna viro.

— Ĉu vi forpelis ŝin? — demandis la alia.

— Ne. Mi tre batis ŝin, kiam mi sciigis pri ŝia malfideleco. Plurfoje ŝi ne kuraĝis trompi min, eĉ ŝi timis ĵeti rigardon al fremda viro. El ŝi fariĝis la plej bona edzino. Bedaŭrinde ŝi mortis antaŭ tri jaroj kaj nun jam ŝi ripozas en la tombejo.

— Ankaŭ la mia provadis trompi min — vigliĝis la alia viro. — Sed mi ĉiufoje antaŭis ŝin.

— Kiel ni komprenu?

— Antaŭ ol trompi min, mi serĉis amatinon. En la najbaro estis junedzino kaj mi ofte vizitadis ŝin. Kiom belega virino ŝi estis! Ankaŭ nun mi vidas ŝian perfektan korpon. Ŝi havis allogajn mamojn kaj ŝia rigardo tiris min en la liton. Se vi estus vidintaj ŝin! Kial oni maljuniĝas?

— Kie ŝi estas nun?

— En la najbaro.

— Kio estas la problemo? Ĉu via edzino ne permesas al vi iri al la najbaro?

— Mi eksedziĝis antaŭ multaj jaroj. Mi jam ne memoras kiam. Mi estas solulo.

— Nu, tiam iru al tiu junedzino!

— Ĉu mi iru? Kial?

— Por ke viaj sopiroj plenumiĝu?

— Ĉu vi pensas, ke ŝi restis juna? Pri kiu mi parolas, ankaŭ ŝi maljuniĝis. Krome ŝi dikiĝis kaj

jam ŝi ne havas perfektan korpon, kiel antaŭ multaj jaroj, kiam ni ankoraŭ estis junuloj

— Jes, jes, la jaroj forflugis, kiel aŭtune la birdoj — rimarkis malgaje la alia kaj ili samtempe rigardis al la okdekjarulo, kiu duondorme aŭskultis ilin. — Ĉu ankaŭ vi havis belan amoromancon?



Li malfermis siajn okulojn kaj poste li trinkis kelkajn gutojn da biero kaj li diris:

— Jes ankaŭ mi havis kelkajn, se nun mi komencus rakonti ilin ni restus tie ĉi ankaŭ morgaŭ. Vi pravas, la vivo estas mallonga por ke oni ĝuu la tutan. Estus bone, se oni vivus ducent jarojn. Eble ankaŭ ĝi estus malmulta. Sed kion fari, se la Sinjoro donis al ni nur tiom da jaroj. Ĝis la fino oni devas ĝui ĝin kaj ni atentu, eĉ unu sekundo ne perdiĝu.

— Pri kio vi parolas? — demandis mire la du maljunuloj kaj malpacience atendis, kion diros al ili la okdekjarulo. — Ni estas tre scivolaj.

— Antaŭ du semajnoj mi geedziĝis.

— Ĉu vi geedziĝis? — ili ekkriis. — Kial ni ne aŭdis pri ĝi?

— Ĉar la geedziĝa ceremonio okazis en alia urbo. Antaŭ nelonge ni venis hejmen.

— El kiu pensiulohejmo vi elektis „la junedzinon”?

— Ĉu pensiulohejmo? — demandis mire la okdekjarulo. — Ŝi antaŭ nelonge faris la abiturientan ekzamenon.

— Ja, ŝi povus esti via nepino — diris la du viroj kaj ili preskaŭ falis de sur la seĝo pro la surprizo.

— Jes — respondis la okdekjarulo. — mi diris al vi oni devas ĝui la tutan vivon, eĉ unu sekundo ne estu perdita.

La okdekjarulo trinkis la restintan bieron, li ekstaris kaj iris hejmen al sia junedzino.

— Apáti Kovács Béla —



POEZIO

Poemo dediĉita al 160 jariĝo de esperanto uzado

Lazaro Ludoviko
via E-o gramatiko
al ĉiu konvenas,
al ĉiu bonvenas!
Laŭdata akuzativo
servas kiel forta lokmotivo
por ke nia trajno ne stumblu,
stirante nin de unu al la alia,
iranta ĉiam antaŭen, nun eĉ plu.
Diminutivon ni facilernigas.
Ĉar dometo aŭ domego
dependas nur de via ego!
Esperantistoj estas gaja, helpema amikar`
troviĝnta en montar`aŭ apud mar`.
Ili ĉiam donos bonetoson
per kant`bela aŭ ŝerco navigvela.
Ja, gravas ke oni ĉiam pravas
dirante: Lernu, verku, kaj parolu
ĉiutage laŭte aŭ lante
gravas nur esperante!
Esperanto oferta esperon, amikadon
Senpagan reton aŭ klasikan
laŭnivele virtualan
Esperanto edukadon!

Verkis: Miriĉ Jadranka Zajeĉara esperanto klubo
2019 Serbio



Senneĝa vintro

Nuboj nigraj
Vento frosta
Zumas kahelforno
Ie ekploras infano.
Vintro.
Mi rigardas ĉielon
kaj atendas neĝon.
Sed ĉi-jare
ĝi ne venas,
la pejzaĝo restas nigra.
Stranga vintro estas
en memoro, la vera.
Mi sonĝas pri neĝofolkaj.
Ili estas nur revo.
Forpasis la vera vintro.
Ĉu iam ĝi revenos?

— La homo —



Kelkvorte

Ne forgesu la junecon,
kiu trompis vin kaj sorĉante
iluzion donacis al vi
Allogajn minutojn.
Nun la juneco trompas
aliulojn ridaĉante.

— La homo —



Por infanoj



La malgranda papilio

Iam sur la flora kampo vivis malgranda papilio. Ĝi estis feliĉa, ĉar dum la tuta tago ĝi povis flugadi de floro al floro. Ĝi tre ŝatis babiladi. La papilio babilis kun ĉiuj, kiujn ĝi renkontis flugante.

— Salut', hirundo kara! — ĝi salutis la hirundon. — Kien vi iras?

— Mi flugas al la riverbordo, ĉar la najbaro diris, ke tie estas multaj kuloj. Mi ne havas tempon por babiladi.

La malgranda papilio restis sola. Ĝi ekiris serĉi babilpartneron.

Ĝi iris al la talpo, sed ankaŭ ĝi ne havis tempon por babiladi, ĉar ĝi devis renovigi sian dometon.

— Revenu morgaŭ, kiam mi renovigos mian dometon! Tiam mi havos libertempon por babiladi kun vi.



La malgranda papilio flugis plu triste. La loĝantoj de la flora kampo ĉiuj estis okupitaj kaj ili ne volis babiladi. Tio ĉi tre malgajigis ĝin. La vivo estas enuiga, se oni ne havas kunulon. Ĝi jam ne deziris flugadi de floro al floro. Ĝi sidaĉis sur sekan herbon kaj ĝi malĝojis.

La malgranda papilio havis tre malbonan humoron. Kion fari, se neni deziras babiladi kun ĝi?

Kiel ĝi sidadis sur la herbo neatendite strangajn bruojn ĝi ekaŭdis.

Infanoj proksimiĝis al la flora kampo. Pro ilia kriadado kaj kantado estis laŭta la kampo.

Ili ekskursis kaj pro la longa piedirado ili laciĝis kaj malsatiĝis. Ili ekripozis sur la flora kampo proksime de la malgranda papilio.

Tiam venis la ideo en la kapon de la papilio. Ĝi flugis al ili kaj ĝi rigardis la geknabojn, kiel ili manĝas.

Unue blonda knabino rimarkis ĝin. Ŝi laŭte ekkriis: — Rigardu, tie estas malgranda papilio!

La infanoj eksaltis kaj ili ĉiuj volis kapti ĝin. Sed la malgranda papilio estis tre lerta kaj sukcese forflugis de antaŭ la infanoj. Neniu povis kapti ĝin. Tio ĉi estis bonega ludo kaj ĝi tre plaĉis al la malgranda papilio.



— Instruistino! — plendis malgaje la infanoj. — Ni ne povas kapti ĝin. Bonvolu helpi al ni!

— Sen papiliokaptilo oni ne povas kapti ĝin — diris la instruistino. — Venontfoje ni kunportos ĝin kaj tiam eble ni sukcesos.

La infanoj laciĝis pro la senpaŭza kurado, tial ili eksidis sur la kampon.

Ankaŭ la malgranda papilio ekripozis, ĉar jam ĝi sentis lacecon en siaj flugiloj. Malgraŭ tio ĝi estis tre feliĉa, ĉar ĝi povis ludi kun la infanoj.

Kiam la infanoj ekiris hejmen la malgranda papilio kontente adiaŭis de siaj novaj geamikoj.

— Ĝis la reveno, karaj geamikoj! Venu ankaŭ morgaŭ por ludi kun mi!

— Onklo Adalberto —



Januaro

Januaro

